

ESPERANTO EN AFRIKO

BULTENO DE LA AFRIKA KOMISIONO



Afrika Esperantujo rendevuas en Togolando:
Kpalime gastigos la 9-an Afrikan Kongreson jarfine 2026

Nova alvoko:
konkurso por subvenciotaj projektoj en Afriko

Afrika Komisiono renoviĝis
per novaj membroj, novaj respondecoj

Kolofono

Esperanto en Afriko

Revuo de la Afrika Komisiono, voĉo de afrikaj esperantistoj, platformo por kunlaboro kaj inspiro kaj atesto pri la lingvo en la kontinento.

Redaktoro: Adjévi Adjé, O6 B.P. 61807, Lomé, Togolando;
tel.: +228 995 72 623.

Provlegantoj: Kokou Sagbadjelou,

Kion Faras via landa asocio aŭ via Esperanto-klubo en via lando? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ komentojn, opiniojn pri aperintaj artikoloj en la periodaĵo. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por

la plibonigo de la publikiga laboro en Afriko al:
redakcio@esperanto-afriko.org

Limdato por la numero 54: la 28-an de februaro 2026

Membroj de la Afrika Komisiono 2025 – 2028

Kunordiganto: S-ro Manirakiza Aime Patrick. **Burundo.**

Vickunordiganto: S-ro John Magessa. **Tanzanio.**

Sekretario I: S-ro Koffitche Koufionou (Retradio). **Togolando.**

Sekretario II: S-ino Ranja Lydie Zafinifotsy. **Madagaskaro.**

Membro: S-ro Adjévi Adjé (retpaĝo, bulteno). **Togolando.**

Membro: S-ro Espoir Kasati (Instruado, Junularo). **DR Kongo**

Membro: S-ino Lakhira Rochdi. **Maroko.**

Enhavo

P. 2 Kolofono

P. 2 Vortoj de la redaktoro

P. 3 Nova alvoko:
konkurso por subvenciotaj projektoj en Afriko

P. 4 Afrika Esperantujo rendevuas en Togolando:
Kpalime gastigos la 9-an AKE jarfine 2026

P. 5 De Samarkando al la mondo:
internacia UEA-delegacio pledis por Esperanto

P. 6 Afrika Komisiono renoviĝis
per novaj membroj, novaj respondecoj

P. 7 Afriko moviĝas: esenco de la Afrika Agado de UEA

P. 8 La redakcio intervjuis Ranja Lydie Zafinifotsy

P. 10 Kantoj, skeĉoj kaj kvizo:
Zamenhoffesto en IZO

P. 10 Togolando kulture, nova verko de Kokou

P. 11 De Kotonuo al Portonovo ĝis Grand Popo:
ekskursoj kaj renkontoj de e-istoj en Benino

P. 13 Esperantista studvojaĝo al Nagbeto kaj Aklowa:
malkovro de naturaj mirindaĵoj de Togolando

P. 14 De Brno al Lomeo, Esperanto kunigas kaj inspiras

P. 14 Deziras korespondi...

P. 15 Forpasoj

Karaj legantoj, karaj geamikoj,

Saluton kaj bonvenon en la novjaron 2026! Kiel estas ofte dirate, oni ĉiam revenas tien, kie la koro sentas sin hejme. Post pli ol kvarjara paŭzo, kun speciala emocio kaj renovigita energio mi denove transprenas la taskon kiel redaktoro de la Afrika bulteno.

Ĉi tiuj kvar jaroj estis riĉaj je lecionoj, sed la ligo kun nia periodaĵo kaj kun vi neniam vere rompiĝis. Mi observis de malproksime la evoluon de nia bulteno, la persistemon de la aktivuloj kaj la disvolviĝon de Esperanto en nia kontinento. Dankon al la teamo, kiu stiris la ŝipon dum mia foresto, certigante la kontinuecon de ĉi tiu esenca voĉo.

Hodiaŭ mi revenas ne por fari kiel antaŭe, sed por konstrui la estonton kun vi. Mia aspiro estas igi la paĝojn de la bulteno vera spegulo de la Esperantlingva Afriko: dinamika, diversa kaj antaŭenrigardanta.

Ek al la laboro do! Ni skribu ĉi tiun novan ĉapitron kune. Dume, mi deziras feliĉan novjaron kaj ĝojan legadon al vi ĉiuj!

Adjévi Adjé

Nova alvoko: konkurso por subvenciotaj projektoj en Afriko

■ Afrika Komisiono de UEA

La Afrika Komisiono de UEA lanĉas freŝan alvokon al esperantistoj kaj organizaĵoj en Afriko por partopreni en la konkurso de la programo “Ni semas”, kiu celas subteni konkretajn projektojn por disvastigi kaj fortigi Esperanton sur la kontinento.

La programo, iniciatita de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en 2015 kaj ekde 2022 kunordigata de la Afrika Komisiono, jam fariĝis grava ilo por instigi lokajn iniciatojn. Nun denove malfermiĝas la okazo al novaj ideoj.

Kiaj projektoj povas kandidatiĝi?

La subvencioj celas larĝan gamon da agadoj, interalie: a.) Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, b.) Trejnseminarioj por instruistoj, c.) Ekzamen-preparoj kaj okazigo de ekzamenoj, ĉ.) Eldonado de lernolibroj kaj instrumaterialo adaptitaj al afrikaj bezonoj (inkluzive afriklingvajn enhavojn), d.) Kultura interŝanĝo kun aliaj mondopartoj pere de Esperanto, e.) Sendado de skrib- kaj lernmaterialoj al lernejoj kaj f.) Informaj kampanjoj en universitatoj kaj altlernejoj.



Kiel kandidatiĝi?

Ĉiu propono konsistu el mallonga priskribo de la projekto (maksimume unu paĝo) kaj financa plano (aparta paĝo), klare montrante la bezonatan sumon kaj la parton, kiun la organizanto(j) mem provizas.

La oficiala petilo estas elŝutebla en PDF-formato aŭ rekte plenebla komputile per la jena ligilo <https://www.esperanto-afriko.org/download/petilo-de-la-programo-ni-semas>. Projektproponoj sendiĝu al nisemas@co.uea.org ĝis la 31-a de marto 2026.

Kiom da monsubteno eblas?

La maksimuma subvencio por unu projekto estas 100 eŭroj. La aljuĝo dependos de la realismo de la plano kaj la pravigo de la petata sumo. Oni rajtas kandidatiĝi kun pluraj projektoj en la sama jaro. Kvankam propra financa kontribuo aŭ aliaj fontoj ne estas nepraj, ili estos konsiderataj kiel pozitiva faktoro.

Per ĉi tiu konkurso, la Afrika Komisiono de UEA volas montri, ke Esperanto en Afriko ne nur vivas, sed kreskas. La programo “Ni semas” celas doni semojn de espero kaj konkretajn rimedojn, por ke lokaj projektoj ekfloru.



Afrika Esperantujo rendevuas en Togolando:

Kpalime gastigos la 9-an Afrikan Kongreson jarfine 2026!

La Afrika Komisiono en kunlaboro kun la Estraro de UEA havas la plezuron anonci oficiale, ke Togolando estas selektita por gastigi la 9-an Afrikan Kongreson de Esperanto (AKE). Ĉi tiu tutkontinenta evento okazos en Kpalime, la kvara plej granda urbo de Togolando kaj la ĉefa turisma centro de la montara regiono, de la 26-a ĝis la 31-a de decembro 2026.

Post senindulge severa pritakto de la alvenintaj kandidatiĝoj de Kenjo kaj Togolando, la invito de Togolando aperis kiel evidenta elekto. Lando de renkonto, paco kaj kultura dinamismo, Togolando enkarnigas la idealojn de nia movado. Ĉi tiu kongreso okazos sub la inspira temo: *Esperanto, lingva ponto por senlima Afriko*.

En la kunteksto de kreskanta interkontinenta integriĝo, la 9-a AKE celas montri kiel Esperanto povas servi kiel levilo por tutafrika unueco. Togolando havas relative viglan Esperanto-komunumon kaj admiran tradicion de gastamo. Elekti Togolandon signifas elekti konstrui solidan ponton inter afrikaj kulturoj.

La kongreso ne nur estos vidalvida renkontiĝo por intelektaj kaj lingvaj diskutoj, sed la partoprenantoj el la tuta mondo ankaŭ havos okazon eklerni pri la loka kulturo, kaj partopreni en laboraj kunsidoj pri interafrika kunlaborado, kaj lingva neŭtraleco. Ili partoprenos ekskursojn



por malkovri la turismajn allogaĵojn de Togolando: de la montaro ĝis la trankvilaj bordoj de la lago Togo, neforgesante la belajn sablajn plaĝojn ĉe Atlantika Oceano. Ili krome festos la alvenon de 2027 per neforgeseblaj vesperoj en plurlandeca etoso, ĝuante la naciajn programerojn, internacian balon, koncertojn de amatoraj kaj profesiaj kantistoj ktp.

La Kongresa Organiza Komitato (KOK) invitas Esperanto-parolantojn el Afriko kaj aliaj kontinentoj jam noti la datojn en siaj agendoj. La 9-a AKE estos grava publika elpaŝo al la pliiĝo de la prestiĝo de la internacia lingvo

en Afriko kaj la plifortigo de ne sud-sudaj kunlaboraj retoj, sed ankaŭ tutmondaj.

Detaloj pri partoprenkotizoj, loĝeblecoj, ekskursoj kaj la aliĝilo baldaŭ estos haveblaj ĉe esperanto-afriko.org kaj tra diversaj komunik-listoj de la Afrika Komisiono de UEA.

La Afrika Kongreso de Esperanto estas la plej granda internacia Esperanto-renkontiĝo en Afriko, kuintime kun cento da aliĝantoj el dudeko da landoj tra la mondo. Ĝi disvolviĝas sub la aŭspicio de UEA kunlabore inter la kontinenta komisiono. Jam okazis entute 8 AKE: 2 en Benino, 2 en Tanzanio, po 1 en Ganao, Senegalo Burundo kaj Togolando. Tiu ĉi estos la 2-a en Togolando post la 1-a en la jarŝanĝo 1990-1991.



De Samarkando al la mondo: internacia UEA-delegacio pledis por Esperanto

■ **Espoir Ngoma Kasati**



Dum dek kvin tagoj en Samarkando, grava historia urbo de Uzbekio laŭ silka vojo, renkontiĝis pli ol 4500 personoj el kiuj diplomatoj de membro-ŝtatoj de Unesko kaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj, kadre de la 43-a Ĝenerala Konferenco de Unesko. Universala Esperanto-Asocio estis reprezentita de internacia delegacio, kiu konsistis el Mireille Grosjean (Svislando), François Lo Jacomo (Francio), Ningna Wei (Ĉinio), Nathalie Kesler (Francio), Espoir Ngoma Kasati (DR. Kongo), Max Garcia (Hispanio), Shah-Ahmad Mutalov (Uzbekio).

Dum la konferenca periodo, nia laboro estis: disdoni informilojn per kiuj ni reklamis la 26-an de julio kiel Mondan Tagon de Esperanto; kontakti kun diplomatoj reprezentantaj membro-ŝtatojn de Unesko; kontakti kun reprezentantoj de aliaj NRO-j kun la celo informi ilin pri la graveco de

Esperanto kaj sekve peti ilian subtenon favore al Esperanto.

Indas menci, ke dum tiu ĉi Konferenco la svahila sukcesis elektiĝi kiel oficiala laborlingvo de la Ĝeneralaj Asembleoj de Unesko. Ni lernis kiel la svahila sukcesis kaj kiamaniere elpaŝi ankaŭ por Esperanto. La sukceso de la svahila ja tre multe inspiris nin kaj ankaŭ prilumis la vojon de esperantistoj, kvankam la svahila havis fortan apogon de membro-ŝtatoj de orientafrikaj landoj, kie ĝi estas vaste parolata.

Dum la debato pri ĝenerala politiko Mireille Grosjean prelegis nome de la delegacio de UEA. En sia prelego, ŝi alvokis la membro-ŝtatojn konsideri la gravecon de Esperanto por internacia interkomunikado kaj interkulturaj interŝanĝoj inter la popoloj de la tuta mondo. Ŝi menciis du rezoluciojn per kiuj Unesko agnoskis la valoron de

Esperanto en 1954 kaj 1985. Krome, Mireille aldonis frazojn dirante ke: *same kiel la svahila lingvo transiras limojn de orienta Afriko, Esperanto transiras limojn tutmonde.* Tiu ĉi frazo ĝustasence ne komparas la du lingvojn, sed montras skalon de kunligado laŭ ĉies uzado el interkomunikada kaj interkultura vidpunktoj. Per tiu prelego, ni Esperanto-parolantoj havis du rekomendojn por Unesko, nome rekoni la 26-an de julio kiel Mondan Tagon de Esperanto kaj enskribi Esperanton sur la liston de ne-materiaj heredaĵoj, krom ankaŭ mencio de du prioritatoj: Afriko kaj Virinoj.

Nia delegacio estis tre scivolemeveka pro ĝia konsisto. Pluraj diplomatoj ĉefe tiuj, kiuj ne sciis pri Esperanto volonte akceptis interŝanĝi kun ni kaj poste interrilati. Ni estis invitataj de lokaj uzbekaj aŭtoritatoj por komuna manĝo en restoracio, kie troveblis la bongustega tradicia plado (Pluf). Same nin invitis profesoro pri la angla filologio en universitato pri alilandaj lingvoj. Tie Mireille Grosjean ankaŭ prelegis pri Esperanto antaŭ deko da ĉarmaj gestudentoj. Interese estis sperti kiel malsamkontinentanoj formis delegacion ĉiuj el malsamaj landoj kaj povis interkompreniĝi per Esperanto. Nia partopreno estis pozitiva ĉar Esperanto estis reklamita de vera internacia delegacio en tiel altranga Konferenco.

Ni vizitis ankaŭ s-ron Anatolij Lonesov, multjara samarkanda esperantisto kaj verkisto. Ĉe li ni gastis ankaŭ kun Adrien Tanner, esperantisto kaj profesia interpretisto dungita de Unesko por interpreti de la rusa kaj la angla al la franca kaj inverse. Ni spektis filmon pri diversaj agadoj de Anatolij Lonesov por Esperanto en Samarkando kaj Uzbekio ĝenerale, kaj ricevis donacojn de li. Tre simpatia viro, babilema kaj gastama, li donacis ankaŭ libron, kiun li kaj lia frato kunverkis pri la historio de la Esperanto-movado en Centra Azio. Estas dikvoluma libreto, reliefiganta riĉan historion de Esperanto en tiu parto de la kontinento.

Finiĝis la Konferenco, ni revenis hejmen ĉiuj. Restas nia tasko nun plurilati kun tiuj diplomatoj, antaŭenigi niajn klopodojn al plena sukceso de la du celoj kunlabore kun la membro-ŝtatoj de Unesko.



Afrika Komisiono renoviĝis per novaj membroj, novaj respondecoj

La Afrika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio (UEA) eniris novan fazon. Dum sia kunveno la 8-an de novembro 2025, la Estraro de UEA unuanime aprobis la freŝan konsiston de la Komisiono, kiu nun kunigas spertajn kaj novajn fortojn sub la kunordigo de Manirakiza Aime Patrick el Burundo.

Aliaj komisionanoj estas John Mageŝsa (Tanzanio) – vickunordiganto; Koffitche Koufionou (Togolando) – sekretario I, respondeca pri retradio;

Ranja Lydie Zafinifotsy (Madagaskaro) – sekretario II; Adjévi Adjé (Togolando) – respondeca pri retpaĝo kaj bulteno; Espoir Kasati (DR Kongo) – pri instruado kaj junularo kaj Lakhira Rochdi (Maroko).

La Komisiono celas konsili la estraron de UEA pri afrikaj aferoj, subteni la evoluon de Esperanto en la kontinento, fortigi kunlaboron inter landaj Asocioj kaj kluboj, kaj plifortigi la voĉon de afrikaj esperantistoj en la tutmonda komunumo. Ĝi ludas ankaŭ

gravan rolon en la trejnadoj kaj regionaj iniciatoj.

La oficperiodo 2025–2028 promesas esti dinamika, ĉar la novaj membroj kun sia energio kaj laborkapablo alportas freŝan impulson al la funkciado de la Komisiono. UEA invitas ĉiujn esperantistojn subteni la iniciatojn kaj aktive partopreni en projektoj, precipe en Afriko – la hejmkontinento de la homaro

Afriko moviĝas: esenco de la Afrika Agado de UEA

■ Adjévi Adjé

La Afrika Agado havas interesan historion, kiu spegulas la diversajn kulturojn de Afriko. Post togolandano Gbeglo Koffi (1998–2004) refoje en 2019 kaj poste en 2025 elektiĝis en la Estraro de UEA afrikaj esperantistoj, nome burundano Jérémie Sabiyumva kaj malagaso Miora Raveloharison. Samjare en novembro reorganizigis per novaj membroj la Afrika Komisiono, laborgrupo de UEA konsistanta el afrikaj esperantistoj, dediĉita al la disvastigo de Esperanto, fortigo de Esperanto-movado, faciligo de interkomunikado inter afrikaj esperantistoj kaj subteno de Esperanto en la kontinento. Ĉi tiu Agado estas plejparte kunordigata de la Afrika Komisiono, kiu respondecas rekte al la Estraro de UEA.

Relative juna, sed komplete nova la komisiona teamo ne estas, ĉar pluraj personoj en ĝi estas fakte veteranoj, kiuj garantias kontinuecon en la funkciado de la Afrika Agado. Kelkaj laboris ankaŭ en la antaŭaj komisionoj dum deko da jaroj. Respektive ekde de la jaro 2008 kaj 2019 ĝis sia estraraniĝo Jérémie kaj Miora laboris kiel komisionanoj spertigante pri la afrika kaj tutmonda movado, ekzemple. Ambaŭ do nature estas nun la ĉefaj kontaktantoj, kun Patrick Manirakiza kiel kunordiganto, pri la planado kaj efektivigo de la agadoj de UEA en Afriko.

Membroj de la Afrika Komisiono estas en regula kontakto ankaŭ kun la aliaj estraranoj de UEA kaj kun landaj

asocioj aliĝintaj al UEA, kluboj kaj unuopuloj en la landoj, kie ankoraŭ ne ekzistas la movado. Granda avantaĝo estas, ke multjaraj spertaj esperantistoj, i.a. ekskunordigantoj de la Afrika Komisiono, pluaktivas en la kontinento kaj praktike ĉiutage helpas en la funkciado de la Afrika Agado kaj asistas per konsiloj la komisionanojn. Krome, jam tradicie la Afrika Agado havas fidelajn kunlaborantojn ankaŭ ekster Afriko, kiuj diligente helpas en la gvidado de komencantaj kaj progresantaj lernantoj de Esperanto en la kontinento.

Informado pri Esperanto kaj organizado de instruado daŭre havas altan prioritaton en la komisiona taskaro, sed UEA-kunlaborantoj, oficistoj havas ŝlosilan rolon ankaŭ kiel plenumanto de la planoj kaj decidoj de la Afrika Agado. Pri la enkontinentaj agadoj kaj de la afrika Esperanto-movado ĝenerale oni povas informiĝi per la bulteno *Esperanto en Afriko*, kies redaktadon laste denove transprenis togolandano Adjévi Adjé, post ĉ. 4-jara foresto.

Kelkaj el la praktikaj ĉefaj agadoj de la Afrika Agado estas organizado de tutkontinentaj kongresoj, seminarioj por kunigi esperantistojn, trejni aktivulojn kaj diskuti pri la estonteco de la movado en la kontinento. Ekzemple, la Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) okazas ĉiujn tri jarojn kaj unuafoje okazis en Afriko la Universala Esperanto-Kongreso (UK), precize en la tanzania urbo Aruŝo en



la jaro 2024. La Afrika Agado konsistas ankaŭ el subteno de la laboro de landaj kaj lokaj Esperanto-movadoj per diversaj rimedoj, inkluzive de financa subteno kaj provizado de materialoj. La Afrika Komisiono ankaŭ iniciatas kaj subtenas projektojn celantajn la disvastigon de Esperanto en Afriko, kiel ekzemple kursoj, eldonado de lerniloj kaj kultura interŝanĝo per la subvenciprogramo *Ni semas* de UEA, celanta subteni malgrandajn E-projektojn en Afriko. Estas multaj kursoj kaj informoj en diversaj afrikaj lingvoj. Krom la regulan disvastigadon de informoj pri Esperanto kaj la movado per diversaj rimedoj, inkluzive de la interreto, publikaĵoj, kaj sociaj amaskomunikiloj, la Afrika Komisiono laboras ankaŭ por establi rilatojn kun publikaj instancoj en afrikaj landoj por diskonigi la uzon de Esperanto.

Esperanto estas parolata en multaj afrikaj landoj, kun aktivaj komunumoj en landoj kiel Benino, Burundo, DR Kongo, Madagaskaro, Tanzanio, Togolando kaj en multaj aliaj regionoj. La elspezoj por informado kaj instruado kaj por subteno de afrikaj landaj asocioj kaj lokaj kluboj estas financataj el la konto *Afriko*, kies rimedoj konsistas ĉefe el donacoj de solidaraj esperantistoj. Interesiĝantoj



pri Esperanto ne mankas en Afriko. La kunordiga teamo de la Afrika Agado estas plena de entuziasmo por kontentigi la petojn de lernemaj samkontinentanoj. Mondonacoj al *Fondaĵo Afriko* estas tre bonvenaj por ebligi tiun laboron, sed bonvenas ankaŭ lernomaterialoj. La mondonacojn oni sendu al UEA kun indiko «Afriko», dum lernilojn oni povas sendi rekte al landaj asocioj kaj kluboj.

La Afrika Komisiono de UEA estas esenca por subteni kaj kunordigi la E-movadon en Afriko. La Esperanto-aktiveco en la kontinento kreskas homforte kaj lingve danke al la entuziasmaj afrikanoj, kaj rimedoj de UEA. La retpaĝo *esperanto-afriko.org* estas ege utila por trovi multajn informojn pri la Esperanto-movado en la hejmkontinento de la homaro.

La redakcio intervjuis Ranja Lydie Zafinifotsy

Ranja Lydie Zafinifotsy estas unu el la plej aktivaj voĉoj de la afrika Esperanto-movado. Kiel membro de la Afrika Komisiono de UEA, ŝi kontribuas al la disvastigo kaj fortigo de la lingvo ne nur en sia hejmlando, sed ankaŭ en la kontinento. Ŝi estas ankaŭ aŭtoro de pluraj libretoj en Esperanto, kiuj atestas pri ŝia kreemo kaj engaĝiĝo el la kultura kampo. En 2025 ŝi ricevis specialan rekonon: eniron en la Panteonon de *edukado.net*, kiel unu el la premiitoj pro sia laboro en la kampo de edukado kaj lingvo-instruado. Ŝia vojo montras la forton de sindediĉo, la gravecon de edukado kaj la rolon de afrikaj esperantistoj en la tutmonda komunumo.

Saluton Ranja! Ĉu vi bonvolas rakonti kiel vi unue ekkonis Esperanton, kaj kio instigis vin daŭrigi ĝis la nivelo de aktiva membro en la Afrika Komisiono de UEA?

Saluton kara! Mi ekkonis Esperanton en 2018, pere de mia kolegino (Vony, kiu antaŭ multe da jaroj jam iomete lernis la lingvon). Tiam, mi lernis memstare, sen helpo. Mi elŝutis librojn, multe legis kursojn kaj komencis fari ekzercojn sen korektado. Sed feliĉe, post kelkaj tempoj mi renkontis sur fejsbuko, Henriel Fidilalao, unu el la plej gravaj E-instruistoj en Malagasio. Ekde tiam, mi sekvis retajn kursojn. Mi vere enamiĝis kun Esperanto, do ĉiutage, miajn retajn afiŝojn faris mi en Esper-

ranto. Patricio Iglesias rimarkis tion, kaj li instigis min kandidatiĝi por eniri la Afrikan Komisionon.

Kiuj estis la ĉefaj defioj por vi kiel afrika esperantistino, kaj kiel vi sukcesis frontis ilin?

Kiel por aliaj afrikanoj, mia plej granda defio estis manko de rimedoj: antaŭe mi lernis Esperanton por la plezuro, sed poste naskiĝis la deziro ĉeesti Esperantan eventon internacian. Por tio necesis mono, feliĉe kiel ano de la Afrika Komisiono, mi havis la ŝancon partopreni la 8-an AKE en Senegalo. Intertempe, mi multe varbis por Esperanto, partoprenis diversajn konkursojn sen mal-kuraĝiĝi kaj tial mi sukcese ĉeestis mian unuan UK-on en Italio 2023.



Kiel vi vidas la evoluon de la Esperanto-movado en Afriko dum la lastaj jaroj?

En Afriko ni havas multajn gejunulojn, kiuj interesiĝas kaj laboras pri Esperanto. Unu el la grandaj fruktoj de la afrika kunlaboro estas la okazigo de UK en Tanzanio. Sekve ne eblas diri ke Afrika movado ne evol-

uas, laŭ mia vidpunkto dum la lastaj jaroj, ĝi vere kreskiĝis kaj pro tio indas subteni la afrikajn junularojn.

Vi estas aŭtoro de pluraj libretoj en Esperanto. Ĉu vi povus rakonti pri la temoj kaj mesaĝoj, kiujn vi volis transdoni per tiuj verkoj?

Mi verkis entute 5 librojn: unu infanlibron, du lernolibrojn, du romanojn. La fonoj de miaj libroj temas ĝenerale pri socia vivo en Malagasio kaj pri la malfacilaĵoj, kiujn virinojn alfrontas ĉiutage. Sed mi ŝatas ankaŭ emfazi la rolon de Esperanto por pli bona mondo per miaj libroj.

Kia estis la reago de la legantoj, precipe en Afriko, sed ankaŭ internacie? Kaj ĉu vi planas pliajn verkojn, pri kio ili povus temi?

Homoj gratulis min, kompreneble ili ankaŭ kuraĝigas min por ĉiam plibonigi kaj daŭrigi la verkadon. Nuntempe, mi laboras pri fikcia romano, la vojo estas ankoraŭ longa ĝis mi finpretigos ĝin, sed mi volas perfektigi la laboron, por kapti pli da legantoj.



Kiel vi sentis vin kiam vi eksciis, ke vi estas unu el la premiitoj en 2025, kiuj eniris la Panteonon de edukado.net?

Tio estis granda surprizo por mi. La disvastigado de Esperanto en mia lando kaj en la kontinenta Afriko estas unu el miaj plej karaj alstreboj. Mi ŝatas instrui ne nur en la lernejo, kie mi profesie laboras sed ankaŭ hejme. Kaj esti rekonita internacie signifas ke mi ne vane laboras.

Kion signifas por vi tiu rekono, kaj kiel ĝi influas vian laboron en la movado?

Esti unu el la premiitoj, kiuj eniris la Panteonon de edukado.net estas granda honoro por mi. Tio motivigas min daŭrigi mian vojon, kuraĝigi ankaŭ precipe junajn afrikanojn kredi je siaj kapabloj por evolui la movadon.

La Panteono celas honori kontribuojn al edukado. Kiun rolon vi pensas ke edukado ludas en la estonteco de Esperanto en Afriko?

En mia lando ni havas devizon: "Edukado estas la plej grava heredaĵo". Do por mi, edukado estas la ŝlosilo. Edukitaj homoj kapablas realigi grandiozaĵojn. Kaj en Afriko ne mankas talentaj homoj nur restas scii eduki kaj eduki.

Kiel aspektas via ĉiutaga laboro kiel ano de la Afrika Komisiono?

Kiel membro de AK, ĉiutage mi sekvas la instrukciojn por reklami kaj antaŭenigi la movadon, partoprenante en la planado kaj strategiaj diskutoj por nia kontinento.

Kiel vi vidas la kunlaboron inter malagasaj esperantistoj kaj la tutmonda movado?

Malagasaj esperantistoj estas malfermitaj homoj. Ili ĉiam pretas al kunlaborado, ekzemple: Mihary estas


la nuna kasistino de TEJO, Miora Estrarano de UEA, mi mem membro de la Afrika Komisiono, Fabrice ĝia konsilanto, Tatiana komitatano B de TEJO. Krome, du el miaj lernantoj verkis librojn sed ankoraŭ serĉas vojon por labori en pli alta nivelo por Esperanto. Junuloj pretaj kunlabori abundas en nia lando.

Se vi povus doni konsilon al junaj afrikaj esperantistoj, kio estus tiu konsilo?

Mia konsilo al ili estas ke ni naskiĝis en malriĉa lando, sed tio ne estas obstaklo por brili. Ni estas kapablaj, ili kredu je si mem, kaj homoj kredos je nia kapablo poste. Ne ili rezignu facile, ni vivas por lerni kaj sukcesi.

Kiel vi imagas la rolon de virinoj en la estonteco de la Esperanto-movado en Afriko?

Nia Esperanto-movado bezonas diversecon, socian konscion, kaj virinoj estas kiel lumturoj. Mi imagas ilin pli kaj pli havi gvidan, edukan, vekan rolon por pli altigi la prestiĝon de Esperanto en la kontinento.



Kantoj, skeĉoj kaj kvizo: Zamenhoffesto en IZo

■ Doumegnon Koffi

La festo pri la 166-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof okazis en Instituto Zamenhof (IZo), en Lomeo, Togolando. La 23-an de decembro 2025, la respondeculoj de la lernejo elektis por la evento. Tiu ĉi dato fermis la unuan trimestron de la lerneja jaro 2025 en Togolando.

Jam je la sepa horo la gelernantoj kaj la geinstruistoj alvenis en la lernejon belege vestitaj por anonci la komencon de la aranĝo. Je la oka horo, seriozaj aferoj komenciĝis per diversaj ludoj gvidataj de la instruistoj; belaj kantoj aŭdiĝis, la gelernantoj prezentis skeĉojn ĝis duono post la deka, kiam s-ro Akate anoncis la komencon de la Zamenhoffesto.



S-ro Sodjehoun gvidis grupon da gelernantoj, kiuj gaje kantis la himnon Esperantistan, kio malfermis la Zamenhoffeston 2025 en IZo. Gelernantoj de la dua kaj tria klasoj de kolegio prezentis interesajn skeĉojn. Poste, sekvis la unua parto de la kvizo, dum kiu, gelernantoj, geinstruistoj kaj gepatroj de gelernantoj gajnis multajn donacojn aŭkcie, loterie aŭ per respondoj al demandoj. Je duono post la dekunua, s-ro N'sougan prezentis prelegon pri la vivo de Zam-

enhof al la ĉeestantaro. Tuj post la prelego, okazis la dua parto de la kvizo, dum kiu, gelernantoj kaj geinstruistoj respondis multajn demandojn pri la vivo de Ludoviko Lazaro Zamenhof. T-ĉemizoj, trinkaĵoj, kolaĵoj, ĉokoladoj, biskivitoj, dolĉaĵoj, E-libroj, revuoj estis disdonacitaj al tiuj kiuj bone respondis demandojn.

Kunmanĝo kaj belaj E-kantoj, poemoj prezentitaj de la gelernantoj fermis la feston en tre belega etoso kiam estis 26 minutoj post la dektria.

Togolando kulture, nova verko de Kokou



Togolando kulture estas la titolo de la nova ilustrita libro de Kokou Sagbadjelou, emerita instruisto kaj esperantisto. Kun amplekso de 34 paĝoj – tralegebla maksimume du horojn – la libro prezentas, krom rakontojn en kiuj rolludas bestoj, proverbojn, enigmojn, regulojn de bona konduto, popolaran manieron nomi homojn laŭ iliaj naskiĝtagoj en la marborda regiono de Togolando.

La verko prezentiĝas kiel vojaĝo tra la multfaceta identeco de Togolando, regiono kies historio kaj kulturo ofte restis en la ombro de koloniaj rakontoj. La aŭtoro celas montri, ke Togolando ne estas nur geografia spaco, sed viva mozaiko de longdaŭraj tradicioj kaj kutimoj. La libro estas verkita en simpla lingvaĵo kaj ebligas al la leganto konatiĝi kun interesa socia vivmaniero.

Pli da informoj ĉe <https://www.esperanto-afriko.org/2025/11/25/nova-libro-el-togolando/>

De Kotonuo al Portonovo ĝis Grand Popo: ekskursoj kaj renkontoj de esperantistoj en Benino



■ Didier Izacard Adjévi Adjé

Inter la 11-a kaj la 26-a de decembro 2025 vizitis Beninon, franca esperantisto loĝanta en Germanio, Didier Izacard. Surloke li, kune kun la beninano Cyprien Guiya kaj Adjévi Adjé el Togolando, vizitis kelkajn fascinajn lokojn. La ekskursoj ne nur estis turisma esploro, sed ankaŭ kultura renkontiĝo. Niaj itineroj kondukis nin al la vilaĝo sur akvo Ganvie, Portonovo, marbordaj pejzaĝoj de Grand Popo, neforgesante la promenadojn en la stratoj de Kotonuo. La kunrestado kulminis per amika kunmanĝo kun alia benina esperantisto François Hounsounou kaj lia pli juna frato. Tio ĉi donis al la tuta sperto specialan homan larĝecon.

Ganvie estas unika vilaĝo, kie domoj estas konstruitaj sur palisoj super la akvo-nivelo. Ĝi estis nia unua vizitcelo. Ni alvenis per barko por turistoj, glitante sur la akvoj de la lago Nokoue. La domoj, starantaj sur lignaj kolonoj, donis impreson de harmonio

inter homoj kaj la naturo. Ni observis la ĉiutagan vivon de la vilaĝanoj: fiŝkaptadon, bazarojn sur la akvo kaj infanojn lerte moviĝantaj per siaj pirogoj. La etoso estis kvazaŭ paŝo en alian mondon, kie la ritmo de la akvo diktis la vivon.

Portonovo, la politika ĉefurbo de Benino, estis nia dua ekskursloko. Alian tagon ni vizitis la urbon, kiu prezentis pli trankvilan atmosferon kompare kun Kotonuo. Nia fokuso estis la esplorlertigejo Songhai, internacie konata pro siaj projektoj pri agrikulturo kaj daŭrigebla evoluo. Post bonega regalo per manĝaĵoj en unu el la surlokaj restoracioj, jen ni, sub la gvido de funkciulo de la centro, (re)vizitante la 22-hektaran bienon. La tuta posedaĵo estas vera

modelo de daŭripova evoluigo interalie, kun ties fiŝbredadaj basenoj, kortbirdaj bredejoj, biogasaj produkt-ejoj, maŝinfabrikejoj, ekologiaj praktikoj kaj kapabligejoj por internaciaj gejunularoj.

Kotonuo, la plej granda kaj ekonomia urbo de Benino, prezentis tute alian etapon de niaj vizitoj. La urbo etose viglis per siaj bazaroj, precipe la fama Dantokpa, kie oni trovas ĉion: de spicoj ĝis artaĵoj. Ni iris tra la stratoj, sentante la pulson de evoluanta Benino, kun trafiko, koloro kaj energio. Babiladoj kun lokanoj montris la gastamon, varmon kaj diversecon de la urbanoj.

Iom pli poste ni direktiĝis al Grand Popo, fama pro siaj longaj sablaj plaĝoj kaj historiaj rakontoj. La plaĝoj



etendiĝis senfine, kun la Atlantika Oceano brue frapanta la bordon. Ni eksciis pri la kolonia pasinteco de la regiono, kie komerco kaj kulturo interplektiĝis. La loko ankaŭ estas konata pro fiŝkaptistaj vilaĝoj kaj tradiciaj praktikoj, inkluzive de Voduo, kiu ankoraŭ ludas gravan rolon en la loka kulturo. La kontrasto inter la trankvilo de la plaĝoj kaj la profunda historia memoro igis Grand Popo admire interesa. Ni ne povis malhelpi al ni jen ekamikiĝi kun fiŝkaptistoj, kiuj malavare rakontis pri siaj aktivaĵoj, jen kuntrinki bieron kun lokanoj.

Tiu ĉi raporto ne estus kompleta sen la mencio pri Zamenhof, des pli ke ni estis en decembro. Ni kundividis ne nur vojojn, sed ankaŭ pensojn kaj esperojn pri Esperanto. Vesperon antaŭ nia disiĝo, ni aparte kvinope kunmanĝis en loka restoracio bon-

gustajn manĝaĵojn, celebre la Zamenhofan festotagon kaj poste en pli frua mateno la naskiĝtagon de Didier en la domo. La vilao pleniĝis je ridetoj, kantoj, rakontoj kaj trinkaĵoj... Estis tiel mojose, ke la sperto restos en la memoro de pli ol unu ĉar, krom la ĝuon de naturaj belecoj de Benino inter vizitoj kaj ekskursoj, ni sentis ankaŭ endoman familietan etoson, spite de niaj diversaj devenoj. Kelkajn horojn poste, Didier pludaŭrigis la vojaĝon kune kun François kaj lia frato al Lokossa, kie li gastos kelktage, kaj Cyprien al Azove por reveni al sia laboro, dum mi baldaŭ revenis al Togolando. Nia kunrestado finiĝis kun sento de profunda kontento kaj reciproka dankemo.

Post Lokossa, Didier iris pasigi siajn lastajn tagojn en Bohicon kaj Azove kun Cyprien, vizitante lian far-

mon kun la kokinoj kaj porkoj. Ĉar Cyprien planis transloki la kokinejon al nova kampo, li ekvendis la kokinojn en Azove. Tien ambaŭ veturis nokte per du motorcikloj, unu por porti la valizojn kaj alia por porti ilin mem kun ĉ. 80 kokinoj. En Azove la gasto kaj la gastiganto vizitis Juliette – la fratinon de la unua, kun du filinetoj – kiu zorgis pri la kokinoj. Kristnaskan nokton ambaŭ pasigis unue en la korto de Juliette kaj poste kun iamaj lerneaj amikoj de Cyprien. Tiuj ĉi invitis ilin al festo, laŭtega, en kortego, kie dancmoviĝis junaj viroj, iom agresemaj iom ŝercemaj. Kiel gasto, Didier ankaŭ dufoje kundancis kaj amozpagis la muzikistojn... Multaj novaj travivaĵoj dum mallonga tempo por li!

Fine ĉiuj revenis denove al Kotonuo, kie Didier aĉetis kelkajn suvenirojn antaŭ ol reflugi al Düsseldorf.

Esperantista studvojaĝo al Nagbeto kaj Aklowa: malkovro de naturaj mirindaĵoj de Togolando

■ www.esperanto-afriko.org



Membroj de la dumpaska ĉeesta feria kurso de Esperanto en Lomeo, entuziasmoj pri la naturo kaj vojaĝemuloj veturis en la koron de la naturaj mirindaĵoj de Togolando, dum memorindaj vizitoj al la akvobaraĝo Nagbeto kaj akvofalejo de Aklowa. Ĉi tiu eskapo ofertis al la 14 partoprenantoj, el kiuj 5 estis virinoj, delectan momenton malproksime de la ĉiutaga tumulto de la urbo.

La unua tago estis dediĉita al la malkovro de la akvobaraĝo Nagbeto, esenca infrastrukturo en la produktado de elektro por Benino kaj Togolando. Tuj kiam ni alvenis, ni estis impresitaj de la grandeco de la artefarita lago, kies trankvilaj akvoj reflektis la lazuran ĉielon. Dum la vagado tra la valbaraĵaj instalaĵoj, ni kun fascino ekinformiĝis pri la funkciado de la digego, ĝia rolo en la energiprovizado kaj la defioj ligitaj al ĝia mastrumado. Iom pli poste ŝtonludoj sur la akvoj kunigis kelkajn vizitantojn ĉe la lagobordo, kio ankaŭ ebligis al ili admiri la digegon el alia angulo, dum

ĉiuj ĝuis la trankvilon de la loko kaj la birdovivon, kiu loĝas en la ĉirkaŭaĵo. Belegaj fotoj estis faritaj, eternigante la scenojn de serena pejzaĝo.

La dua tago kondukis nin al la regiono Badu, kie staris en la mezo de densa vegetaĵaro la majesta akvofalo Aklowa, la plej grava en Togolando kun alteco de ĉirkaŭ 100 metroj, falante de granita klifo situanta kelkajn kilometrojn de la vilaĝo Aklowa. Alveninte en la urbo Badu, nia grupo de gajaj geeksursanoj unue estis kondukita al la prefektejo, kie la Prefekto s-ro Somenou Atsu mem bonvenigis nin. La etoso estis amikeca kaj entuziasmplena, atestante reciprokajn interesojn pri malkovroj kaj interŝanĝoj. Ni povis rekte sperti la gastamon de la prefekto per siaj bonvolemaj sintenoj al ni: donacoj, kontaktigo kun la Ĝenerala sekretario de la urbodomo... kaj memorfotiĝo kun la grupanoj.

Post la akcepto en la prefektejo, la grupo direktiĝis al la akvofalo Aklowa. La aliro al la akvofalejo okazis per serpentuma vojo tra abunda flaŭro. Survoje la ĉiĉeronoj elstarigis la riĉecon de la loka ekosistemo, jen almontrante diversajn plantospeciojn, jen konsciigante grupanojn pri la graveco rilate al la konservado de la vegetaĵaro, kaj tiel ni povis mergi nin en la fekundan medion kaj ĝui la esploradon. Kiam ni alvenis, la spektaklo meritis la penon! Refreŝiga naĝado ĉe la piedo de la akvofalo: la plej kuraĝaj el ni tuj ne hezitis ĵeti sin

en la revigligan akvon de la akvofalo, ĝuante momenton de pura feliĉo kaj konekto kun la naturo. Akvoŝpruceroj kaj ridoj ekeĥis, kreante ĝojan etoson. Post iom da tempo pikniko apud la akvo, amika momento, kunigis nin ĉirkaŭ bongusta barbakuo kuirita de niaj lokaj gvidistoj. Estis ankaŭ momento interŝanĝi niajn unuajn impresojn kaj plifortigi la ligojn ene de la grupo.

Ĉe la fino de ĉi tiu dutaga studvojaĝo, la partoprenintoj esprimis sian unuaniman entuziasmon. *La verdaĵo de la arbaroj, la montaro, la akvofalo, ĉio kulmita per la varma escepta renkonto kun la prefekto de Wawa, estis milda inspiro por mi. Tio estis ankaŭ la magio de Esperanto: malkovri aliajn mediojn kaj popolojn en spirito de gajeco kaj kunhavigo, konfidis Nouwoatsi Kossi Séna. Plej multe impresis min la vojo al la akvofalo. De la montosupro, ni povis vidi la panoramon de la urbo kvazaŭ ni estus satelitoj, kaj la akvofluoj en la montaro ĝis la akvofalo estis veraj regaloj, aldonis Elom Yao Sagbadjélou.*

Tiu ĉi sukcesa vojaĝo ne nur ebligis al la partoprenintoj rekonektiĝi kun la naturo, sed ankaŭ malkovri en malstreĉiga etoso la belecon kaj diversecon de togolandaj pejzaĝoj. Pro unuanima atingo kaj neforgesblaj memoroj, Lomea Klubo jam pripensas ripeti similan aranĝon, tiel por kontribui al la antaŭenigo de enlanda turismo kaj la valorigo de la enregiona natura heredaĵo.

De Brno al Lomeo, Esperanto kunigas kaj inspiras

■ www.esperanto-afriko.org

En la ĉefurbo de Togolando, okazis vigla Esperanto-kunveno kun partopreno de 11 (3 virinoj, 8 viroj) esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. La renkontiĝo okazis en la kadro de la monataj grupkuvenoj de lomeaj esperantistoj, kun celo pluvivigi la lokan komunumon kaj la deziron diskonigi la internacian lingvon.

Unu el la kulminoj de la kunveno estis prezento pri la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Kiel preleganto, Adjévi Adjé rakontis pri siaj impresoj de la koncerna kongreso en Brno, montris pri dumkongresaj fotoj kaj respondis al demandoj de la ĉeestantoj. Inter la demandoj levitaj estis, krom pri praktika disvolviĝo de la kulturaj vesperaj programoj kongresaj, la defioj, kiujn alfrontas afrikanoj dum sia vojaĝado en Eŭropo, precipe rilate al elturniĝo kaj adaptiĝo en nova medio.



La partoprenantoj poste ĝuis amikan kunmanĝon, kiu plifortigis la senton de komuneco. Speciala momento estis la disdono de dumkongresaj kunportitaj donacetoj per loterio. Ĉiuj ĉeestantoj ricevis ion, kio alportis ĝojon kaj surprizon al ili.

La kunveno ankaŭ inkludis sesion pri tatuadoj artefaritaj de la 110-a UK. Dum momento partoprenantoj dividiĝis en grupojn po du personoj por apliki elektitajn tatuodezajnojn al

korpopartoj de unu la alian. Kune ni provis imagi, trovi, malkovri la artan kaj kulturen signifon de diversaj tatuodezajnoj. Ĉi tiu parto de la programo vekis amuzan intereson kaj instigis viglajn konversaciojn.

La kunveno, kiu disvolviĝis ĉirkaŭ tri horojn, finiĝis per fotosesio. La sekva okazos venontmonate.

Deziras korespondi...



Saluton! Mi nomiĝas Djesco François Melonekou. Mi naskiĝis en la jaro 1999. Mi loĝas en Lomeo, la ĉefurbo de Togolando. Mi flue parolas la anglan, la francan kaj la evean lingvojn.

En oktobro kaj novembro 2025 mi partoprenis en intensa Esperanto-kurso sub la gvido de s-ro Adjévi Adjé. Mi finlernis la materialon Metodo 11, kaj mi estas kapabla legi, kompreni kaj babili en la internacia lingvo. En decembro mi partoprenis ankaŭ en kelkaj programoj de la 6-a Virtuala Kongreso de Esperanto. Nun mia deziro estas korespondi kun esperantistoj tra la mondo, ĉefe el Britio, Ĉinio, Belgio ktp... Mi ege deziras malkovri la kulturojn en tiuj ĉi landoj. Mi pretas rakonti kaj konigi pri la kulturoj kaj vidindaĵoj en mia lando.

Mi dankas kaj antaŭĝojas ricevi leteron el via lando per mia retpoŝtadreso djescovic@gmail.com aŭ per  +22891869082.

Saluton! Mi nomiĝas Yahya Aslafy, mi estas marokano. Mi estas 23-jara fraŭlo. Mi pasias pri artoj: mi tre ŝatas dancon, muzikon kaj modon. Krome, mi ŝatas vojaĝi kaj malkovri novajn aferojn. Mi aparte emas esplori malsamajn kulturojn, tradiciojn kaj religiojn. Mi ŝatas lerni novajn lingvojn. Tio por mi estas la plej bona maniero krei ligojn kaj amikiĝi tra la mondo.

Mi malkovris Esperanton danke al mia kara patro, kiun mi denove elkore dankas. Mi ĵus finlernis la libron Metodon 11 ĉe Esperanto-Klubo de Lomeo, kie mi gastis plenan tri monatojn. Mi nun deziras regulajn kontaktojn per korespondado kun esperantistoj el la tuta mondo.

Mi deziras kundividi miajn vojaĝspertojn kaj aventurojn kun novaj geamikoj, interŝanĝi pri niaj kulturoj kaj fortigi la internacian Esperanto-komunumon. Mia retpoŝtadreso estas: petitaslafy2@gmail.com.



Forpasoj

Codjo Benoît Zinkpe (1966 – 2025)



La konata benina esperantisto kaj fakdelegito de UEA Codjo Benoît Zinkpe forpasis la 13-an de decembro 2025 en la aĝo de 59 jaroj, pro mallonga malsano.

Benoît estis ledaĵisto, metiisto kun granda lerteco kaj dediĉo al sia laboro. Krom tio, li servis kiel oficisto en la Afrika Oficejo de UEA en Lokossa, Benino. Tie li kontribuis al la ĝeneralaj administraj kaj organizaj taskoj kun sindediĉo. Li partoprenis en diversaj renkontiĝoj kaj projektoj, ĉiam celante disvastigi kaj fortigi la uzadon de Esperanto naci- kaj internaciskale. Li estis patro de 8 gefiloj.

Lia entombigo okazis la 20-an de decembro 2025 en Aplahoué, kie familio, amikoj kaj samideanoj adiaŭis lin.

Emile Malanda Nianga (1967 – 2026)



Emile Malanda Nianga, unu el la longdaŭraj afrikaj aktivuloj, forpasis la 05-an de januaro 2026 ĉe malsanulejo en Matadio, 250 km de lia hejmurbo Mbanza Ngungu (DR Kongo), post mallonga malsano.

Emile Malanda Nianga naskiĝis la 20-an de decembro 1967 en Kwilu-Ngongo, Demokratia Respubliko Kongo. Li eklernis kaj ekinstruis Esperanton en la fruaj 1990-aj jaroj, kaj ekde 1993 li instruis la lingvon ĉe

la Universitato de Kinŝaso. Li fondis Esperanto-Klubon, verkis lernolibron pri Esperanto en la lingala lingvo, projekto kiu celis alporti la internacian lingvon pli proksime al la loka kulturo.

Ekde 1997 li estis individua membro de UEA, kaj li inter 2003 kaj 2006 prezidis DKEA, landan Asocion de DR Kongo. Li ankaŭ aliĝis al Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) en 2000. Dum sia vivo li partoprenis multajn internaciajn E-eventojn, inkluzive de Afrikaj Kongresoj, servis kiel kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA kaj estrarano de ILEI.

Li loĝis kelkajn jarojn en Sud-Afriko, sed en 2019 revenis al Kinŝaso por daŭrigi sian laboron en la movado kaj resti pli proksime al sia lando. Li estis ne nur esperantisto, sed ankaŭ amiko kaj mentoro por multaj junaj esperantistoj. Lia familia vivo kaj persona varmo ĉiam reflektis lian sindediĉon al homoj kaj al la idealo de internacia amikeco.

**Povu Dio doni al ili eternan vivon!
Esperanto en Afriko esprimas sincerajn kondolencojn al la familioj de la forpasintoj, al la geamikoj kaj samideanoj.**

9-a Afrika Kongreso de Esperanto



Kpalime, Togolando
26-31.12.2026